

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 574 (9)

SEPT. 1953



[foto : Bronko Luŝ]

Kostumoj de Samobor (*vidu paĝon 241*)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB
Palais Wilson, Genève, Svislando

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Traduko kaj represo de artikoloj estas
permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton.
Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Cion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

Jara abono (1953) : 15 ŝil. anglaj (kun
membrecio kaj jarlibro 20 ŝil.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅓ paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 80 landoj

Eldonnumero 6000



Enhavo

La 38a Kongreso en Zagreb :						paĝo
Pensoj senpretendaj : <i>Hans Jakob</i>	..	..	..	..	..	241
Interkona vespero	..	..	..	..	..	243
Solena Inaŭguro	..	..	..	..	..	243
Ĝeneralaj Kunvenoj de UEA	..	..	..	..	..	252
Inaŭguro de Zamenhof-Strato	..	..	..	..	..	255
Distraĵoj	..	..	..	..	..	255
Oficiala Akcepto de la Urbestro	..	..	..	..	..	256
Ferma Kunsido	..	..	..	..	..	257
La Somera Universitato	..	..	..	..	..	260
 Marŝalo Tito kaj Esperanto	..	..	..	..	..	 265
 26a Kongreso de SAT en Sheffield	..	..	..	..	..	 270
Konstantaj Rubrikoj :						
Esperantista Vivo	..	..	..	..	..	242
Internacia Konkurso	..	..	..	..	..	242
Nia Forumo	..	..	..	..	..	266
Oficiala Informilo	..	..	..	..	..	271
Radio kaj Esperanto	..	..	..	..	..	264
Tra la Libraro	..	..	..	..	..	269

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 574

Septembro 1953



Finigis la 38-a Kongreso kun Gloro

Pensoj senpretendaj

GI okazis, la unua kongreso plej sudoriente ĝis nun plej proksime al Balkanaj Landoj. Kiom ofte ni tion jam diskutis en pasintaj tagoj, ke devos foje okazi kongreso en unu el tiuj landoj sudorientaj, kie Esperanto havas efektive rolon, kie la bezono de lingvo internacia estas postulo de multnombraj homoj. Kia nun estis la impresoj pri tiu ĉi kongreso en Zagreb, oni nin demandas. Ni iom analizu kaj ni respondu.

Ni konstatas veran intereson ĉe la regantaj rondoj por nia celo. Oni konsideru, ke por multaj jugoslavoĵ la scio de fremda lingvo estas iel deviga. Ne temas pri unu sed pri pluraj tiel nomataj mondlingvoj. Se hodiaŭ la angla lingvo staras unualoke la ceteraj ne perdis sian gravecon por jugoslavo. Ofte oni renkontas tie ĉi homojn, kiuj krom la propra posedas alian slavan, eĉ du, kaj estras unu aŭ du "okcidentajn" lingvojn. Tie ĉi ekzistas lingva problemoj, malpli interna ol tiu de la ampleksiĝantaj rilatoj kun aliaj landoj. Jugoslavujo ne estas je la periferio de Eŭropo sed ponto inter oriento kaj okcidento.

Simpatia al ni estis la sinteno de la enlandanoj. Ni ne faras reklamon, sed citas tion, kion mi spertis mem kaj kion kongresanoj spontanee konfirmis. Simplaj homoj en la strato, demanditaj pri vojo, klopodegis tiri el fundo de cerbo lastajn konojn de germana, aŭ eĉ de angla lingvo por esti kompleza. Okcidentanoj fieraj pri ĝentileco kaj helpemo, ofte ne troveblaj en grandaj urboj, lernu tie ĉi ion. Kortuŝa estis tiu ĉi akcepto de la Esperantistoj en urbeto Samobor. La tuta urbo kunvenis, por saluti la Esperantistojn kun natura, naiva amikeco. Ni aldonu, ke estis por ĉiuj urbanoj libera tago kun salajro pagita de la urbo.

La kongreso mem pasis en bonega atmosfero, la efektive sufokiga varmego ne povis multe malhelpi. Konstato tre grava kaj atentinda por la estonto: la kongresoj specialiĝas. Ne plu estas la laborkunsidoj kiuj altiras la homojn, sed la apartaj prelegoj, ĉu de la Somera Universitato, ĉu aliaj. Ne plu ekzistas la organiza problemoj, kiu iam formis la kernon de la kongresaj diskutoj. Povas



Veceslav Holjevac, Urbestro de Zagreb

“En la nomo de la Estraro de UEA mi havas la honoron malfermi la 38-an Universalan Kongreson de Esperanto. Venintaj el la Nordo akceptis nin en Jugoslavujo la sudo varma, sunbrilo varmega kaj korvarmega akcepto de la homoj. Ĝojas ja ni el Nordo ne tiom dorlotita de la suno. La korvarma akcepto ĝojigas nin ĉiujn. Por la unua fojo okazas kongreso en sudorienta parto de Eŭropo. Bonvolis inviti la kongreson ne nur la jugoslavaj Esperantistoj, ne nur la Urbo Zagreb sed ankaŭ la tuta Jugoslavujo. Tion pravas la malavara subteno de la ŝtataj instancoj por ebligi pompan manifestacion. Speciale menciinda estas la fakto ke la Jugoslava Poŝto honoras la kongreson per specialaj poŝtmarkoj. Tre alte ni taksas tiun geston de honoro.

“Kiel plian afablan geston mi konsideras la ĉeston de reprezentantoj de la Kroata kaj Jugoslava ŝtatoj, la Honora protektanto de la Kongreso, Sinjoro Vladimir Bakarić, ŝtatprezidanto, kiun mi havas la honoron saluti.

“Mi salutas plie la ĉeston de Sinjoro Urbestro de Zagreb, kies bonvenigajn vortojn ni ĵus aŭdis, plie de multaj reprezentantoj registaraj, de la Esperanto-organizaĵoj. Aparte grandan plezuron mi havas, saluti inter ni reprezentanton de UNESKO, Sinjoron Pierre Lebar, kiel observanton.”

Post tiu ĉi eniro la prezidanto de UEA skizas per afablaj vortoj la prepar-laborojn de la kongreso, la fervoron kiun metis ĉiuj kunlaborantoj en ĝin, sub direkto de D-ro Borovečki kaj Sinjoro Mason Stuttard. Li ankaŭ ne forgesas la Esperantistojn kiuj kreintaj la movadon ebligas aranĝi tian potencon manifestacion.

Pli persone la parolanto skizas siajn spertojn dum kelksemajna restado en Jugoslavujo kun edzino, ĉe Dalmata Marbordo kaj en aliaj pentrindaj lokoj de tiu ĉi rava lando. Helpata de Esperantistoj tiu ĉi restado fariĝis ne nur plezuro sed samtempe instruo pri lando kaj popolo, ĝian penan laboron por restarigi parte detruitan landon post lasta milito. Homoj penantaj en urboj kaj sur la kamparo sub suno senkompata, kion nordlandano ne povus. Vidinte tion li komprenis ke tian popolon oni ne povas subpremi, nek per bomboj, nek per invado.

Daŭrigante li atentigas la kongresanaron pri la jara raporto de la Estraro de UEA, pri la agado de la Asocio dum pasinta periodo. Aparte menciinda estas la parto koncerne la

Internacian Lingvon ĉe la Ĝenerala Konferenco de UNESKO dum pasinta aŭtuno, kaŭze de la petskribo de 16 milionoj da homoj, pledantaj por ke Esperanto estu instruata en ĉiuj lernejoj, kie kapablaj instruistoj troviĝas.

Aludante la lingvan problemon, la diversajn aspektojn kiujn ĝi prezentas por tiu aŭ alia popolo, la prezidanto rememorigas pri la unua tia klopodado interesigi areopagon de nacioj pri ĝi, nome la Ligo de Nacioj. Li salutas la iniciatinton de tiu ĝi grandega klopodado, plenumintan netakseblan laboron dum sia tuta vivo kaj kiu daŭre helpas nin per siaj grandaj talentoj, Doktoron Edmond Privat. La detala raporto de la Ligo de Nacioj tiutempe ja multe helpis nin, spite tion ke ĝi ne povis venki la opozicion de certaj kontraŭuloj de nia ideo. Kreiĝis post la dua milito pli forta U.N. kaj ĝiaj sekcioj, inter ili UNESKO. Al ĝi venis la petskribo menciita. Kaj laŭ decido de la ĝenerala konferenco, la Direktoro de UNESKO sin turnis al la ŝtatoj-membroj, kun demandaro pri la Esperanto-Movado. En preskaŭ ĉiuj landoj la registaroj, respektive la UNESKO-komisionoj, oficiale sin turnis al la Esperanto-organizaĵoj por ricevi kompletajn informojn. Kvankam impona, tiu ĉi materialo nun kolektita estas eta laboro plenumita ĉie sur tero pere de la Esperantistoj, kies fina celo estas la paco inter ĉiuj homoj kaj ĉiuj popoloj sur tero. Sesdek ses jarojn, preskaŭ tri generaciojn, la Esperanto-movado altiris je si idealistojn kaj praktikulojn, laborantajn per kaj por Esperanto, igante ĝin vivanta lingvo de vivanta popolo. Efektivaj mondcivitanoj ili ja estas por kiuj la eksterlando iĝos hejmlando. Estis ili kiuj iniciatis la

petskribon al UN por Esperanto, sed ili tion faris kiel mondcivitanoj efektivaj, homoj el ĉiuj tavoloj de la homa socio.

Estas laŭ la konvinko de la prezidanto vera donaco kiun ni faras al UN, kvazaŭ transdonante nian lingvon al ĝi por ke oni ĝeneraligu ĝin. Ni faras tiun ĉi geston, fidante je la homaro kaj je la bonintencoj sur kies fundamento staras la agado de UN kaj de ĝiaj sekcioj, el kiuj UNESKO estas la plej konata kaj plej grava. Ni atendu la rezultaton kun fido.

Konkludante la parolanto emfazas ke li faris penraĵon pri estonto. Povos esti ke tiu ĉi penraĵo ricevos kadron pere de UNESKO. Povos esti ke ni devos ankoraŭ atendi pli longe por vidi tiun ĉi kadron. Estas tutcerte ke ni ĉiuj devas fidele labori por nia afero, kaj finante li citas la vortojn de Doktoro Zamenhof:

“Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante, Ni iru la vojon celitan.

Eĉ guto malgranda, konstante

frapante,

Traboras la monton granitan.

L’espero, l’obstino kaj la pacienco— Jen estas la signoj per kies potenco Ni paŝo post paŝo, post longa laboro, Atingos la celon en gloro.”

Longa varma aplaŭdo dankis la prezidanton-oratoron.

Prezidanto Malmgren transdonas la parolon al la Honora Protektanto de la Kongreso, Sinjoro Doktoro Vladimir Bakarić, Prezidanto de la Kroata Registaro.

Je la granda surprizo, la ŝtata Prezidanto alparolas la kongreson en flua Esperanto, dirante la jenon:

“Estas por mi granda ĝojo, ke mi povas saluti kaj bonvenigi vin nome de la Jugoslava kaj Kroata registaroj. Kiel honora protektanto de via



[Foto : Bronko Luŝ]

D-ro Vladimir Bakarić, Prezidanto de la Kroatia Registaro

kongreso mi sentas apartan kontenton, ke mi povas persone ĉeesti la solenan inaŭguron de via kongreso kaj esprimi miajn bondezirojn por la plena sukceso de la Tridek-oka Universala Kongreso de Esperanto. Jugoslavaj oficialaj instancoj jam dum pluraj jaroj kun granda intereso sekvas la laboron de la Esperantistoj. Ilia laboro por pli facilaj interkompreniĝo kaj kunlaboro inter diversaj nacioj prezentas rimarkindan kontribuon al la ĝenerala strebado

de ĉiuj popoloj por efektivigi pacan kaj amikan kunlaboron en la mondo.

“La egalrajteco kaj rajto je sendependeco de ĉiuj popoloj estas unu el la fundamentaj principoj de Unuigitaj Nacioj kaj ĝuste la Esperantistoj havas en la internacia lingvo rimedon, kiu povas multe helpi por la realigo de ĉi tiuj principoj. La ĝisnunaj atingoj de la Esperanto-Movado, via relative riĉa literaturo, via multnombra gazetaro, viaj kongresoj kaj internaciaj renkontoj


estas pruvoj pri la forto de viaj organizaĵoj kaj pri la grandaj eblecoj, kiujn donas la internacia lingvo Esperanto.

“Du mondmilitoj, la persekutoj de la faŝismaj reĝimoj kaj aliaj malfacilaĵoj kaj baroj ne sukcesis haltigi vian movadon. La perspektivoj de via movado certe estas tre bonaj kaj nur de via fervora, sindona kaj persista agado dependas ĝiaj pluaj sukcesoj. Aparte mi ĝojas ke via kongreso okazas ĝuste en la tagoj kiam nia lando festas la tagon de la popola leviĝo kontraŭ la faŝistaj okupaciintoj. Tio rememorigas min ke inter la plej bonaj batalantoj de la revolucia movado estis ankaŭ multaj Esperantistoj de nia lando, ĉar la Esperantista movado en nia lando estas jam delonge ligita kun la progresemaĵoj fortoj de nia lando.

“Vi ĉi tie kunvenis en fakte impona nombro. Vi alvenis Zagrebon el proksimaj kaj tre malproksimaj landoj. Multaj el vi unuan fojon venis en Jugoslavujon, sed vi ĉiuj certe legis kaj aŭskultis pri nia lando. Eble la informoj kiujn vi ricevis pri Jugoslavujo ne ĉiam estis tute objektivaj kaj veraj. Via restado dum la kongresaj kaj postkongresaj tagoj ebligas al vi persone konatiĝi kun la vivo de niaj popoloj kaj propraokule vidi la veron pri nia ŝtato. Certe, la socipolitikaj konceptoj de niaj homoj ofte diferencas de la viaj, sed en la komuna batalo por unu pli bona mondo, ni ĉiam devas serĉi kaj trovi proksimigojn kaj eviti ĉion, kio povus malhelpi tian bezonon kaj efektive eblan kunlaboron inter la diversaj popoloj.

“Fine, mi denove salutas vin, dezirante al la 38-a Universala Kongreso de Esperanto plenan kaj brilan sukceson.”

(Longa, longa aplaŭdo ripetita)



*D-ro Ivo Borovecki
Prezidanto de la L.K.K.*

La Honoran Protektanton de la kongreso sekvas la prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, la nelacigebla D-ro Borovecki. Kun forta voĉo kaj vervo li diras :

“La 38a Universala Kongreso de Esperanto komencas nun sian laboron; la unuan fojon en la historio de nia movado la Universala Kongreso okazas en Jugoslavujo. Laŭ la nombro de la ĉeestantoj, laŭ la amplekso kaj varieco de la labora programo, kaj laŭ la lingvo uzata ĝi estas unika kongreso. Ĝi estas la plej granda internacia kongreso okazinta ĝis nun en nia lando. Ĝia signifo transiras la kadrojn de la Esperanto-movado; ĝi estas grandega manifestacio de internacia kunlaboro kaj amikeco kaj tial ĝia laboro prezentas gravan okazaĵon por la tuta mondo.

“Mi havas grandan honoron saluti vin en la nomo de la Loka Kongresa Komitato kaj en la nomo de ĉiuj Jugoslavaj Esperantistoj. La hodiaŭa tago, kiam en Zagreb kolektiĝis 1760 Esperantistoj el 30 landoj, signifas por la enlanda movado la plej grandan sukceson en la ĝisnuna laboro por la internacia lingvo.



Lucija Borčić
Kongresa kasistino

“Ni jugoslavaj Esperantistoj estas aparte ĝojaj, ke ni povas bonvenigi tiom da eksterlandaj gastoj. Ni estas certaj ke jugoslavaj Esperantistoj kune kun siaj eksterlandaj amikoj faros ĉion necesan por sukcesigi la laborojn de la 38-a Universala Kongreso. Vi jam nun povis rimarki ke en la urbo, kaj precipe en nia kongresejo, regas vera internacia agordo. Ankaŭ la ekstera publiko kun evidenta scivolemo kaj intereso atendis la komencon de la kongreso kaj ĝi la saman intereson montros ankaŭ dum la kongresaj tagoj.

“La kongreso montros al ĉiuj la forton de nia movado kaj la entuziasmon kaj fervoron per kiu la tutmonda esperantistaro batalas por la noblaj homecaj idealoj de la internacia lingvo.

“Hieraŭ dum la Interkona Vespero en la ejo, kiu svarmis de samideanoj el multaj landoj, mi observis la amikecon kaj veran intimecon kiu regis en tiuj internaciaj rondetoj. Oni povis tuj konstati ke ne estas nur la komuna lingvo kiu interligas nin. Estas ja fakte io pli grava, io pli

profunda. Ĝi estas tiu sento de internacia solidareco, la sento ke ni antaŭ ĉio estas la homoj, kiuj havante malsamajn mondkonceptojn kaj kutimojn, havas samajn homajn taskojn kaj malfacilaĵojn, similajn ĝojojn kaj similajn larmojn. Tiun senton devus la homoj pli multe kultivi kaj ĝuste por tio internacia lingvo estas valora kaj utiligenda rimedo.

“Jugoslavaj Esperantistoj kaj precipe la Zagrebaj esprimas hodiaŭ koran dankon al la Estraro de Universala Esperanto-Asocio, ke ĝi bonvolis akcepti la inviton por la okazigo de la 38-a Universala Kongreso. Zagreb jam dum pluraj jaroj estas unu el la plej konataj centroj de la enlanda movado. Mi deziras substreki la fakton, ke ĝuste antaŭ 30 jaroj okazis en Zagreb la unua kongreso de jugoslavaj Esperantistoj kaj tial la okazigo de la Universala Kongreso en Zagreb estas la plej bona maniero por dece festi tiun ĉi jubilean datrevenon. Fidelaj al siaj tradicioj, harditaj en la senlaca laboro, la jugoslavaj Esperantistoj daŭrigos sian vojon komprenante bone la socian kaj kulturan signifon de la internacia lingvo. Hodiaŭ ni staras ĉe la sojlo de nia kongresa laboro. La Loka Kongresa Komitato dum unu jaro donis sian plejebelon por prepari ĉion necesan por la kongreso. La evoluo kaj rezultoj de la kongresaj aranĝoj montros plej bone kiom ni efektive sukcesis en nia laboro.

“Mi nun havas agrablan taskon eldiri kelkajn dankesprimojn. La Loka Kongresa Komitato renkontis plej grandan helpon ĉe ĉiuj oficialaj instancoj. Montrante plej profundan komprenon por la kongreso la oficialaj instancoj krom grava morala helpo,

disponigis al ni malavare grandegan materian helpon. Ni esprimas nian koran dankon al la Jugoslava registaro, al la registaro de Kroatujo kaj ĝia prezidanto D-ro Vladimir Bakarić kaj precipe al la Zagreba Urbestro kaj al Urbestro k-do Većeslav Holjevac. Ili ĉiuj donis netakseblan kontribuon por la preparoj de nia kongreso.

“Kaj fine mi dankas al vi, karaj kongresanoj, kiuj per tiel multnombraj aliĝoj helpis nian laboron, kaj kiuj bedaŭris nek tempon nek monon por veni al Zagreb, eĉ el la plej malproksimaj landoj. Nin atendas granda laboro, kaj nur nia komuna kaj konkorda serioza laboro estos la plej bona garantio por la fina sukceso de la 38-a Universala Kongreso de Esperanto.”

(Longa aplaŭdo)

La salutparoladon de la prezidanto de LKK sekvas la alparolo de la Registaraj Delegitoj :

Aŭstra : Sinjoro Konsulo Krumharr ; parolante en Esperanto, li aludas la fakton ke Esperanto estas bone disvastigita en Aŭstrujo, ke ĝi havas fervorajn eminentulojn kiel Eksministron D-ron Frenzel, nunan prezidanton de la Supera Financa Kontrolo, Profesoron Sirk, kaj la Urbestron de Vieno, Franz Jonas. Li deziras plenan sukceson al la kongreso.

Aŭstralia : Fraŭlino L. Samblebe ; Ĉarma alparolo, simpatie aŭskultita.

Belga : Sinjoro J. Hérion

Franca : Sinjoro P. Petit

Nederlanda : Sinjoro J. R. G. Isbrucker; Humorplena kiel kutime, la parolanto salutas la kongreson en la nomo de la Nederlanda Registaro, atentigas ke estas nun por la 25a fojo ke lia registaro lin komisiis pri tiu ĉi tasko, informas pri la leĝo prezentita al la

Parlamento favore de Esperanto, kaj dankas por la granda helpo kiun alportis pluraj landoj okaze de la granda katastrofo falinta sur Nederlandon dum pasinta vintro. Bondeziras sukceson !

Norvega : Sinjoro K. Sellin

Sveda : Sinjoro Ernfrid Malmgren

Svisa : Vic-konsulo Max Leu, (germanlingve) skizas la situacion de Svislando, kies popolo estas daŭre interesita je la klopodoj por certigi pacon. Substrekas la ĉiaman intereson de la svisa registaro por nia laborado.

Prenas parolon la Delegito-observanto de

UNESKO, Sinjoro Pierre Lebar, kiu franclingve senkulpigas sin unue pro lia malsperto ne povi paroli al ni en Esperanto, aludas pri la klopodoj nunaj en UNESKO por nia afero.



[Foto: Bronko Luš]

*Parolas S-ro Lebar
La UNESKO-observanto*

Li esprimas sian miron pri la entuziasmo reganta en la kongreso, la facileco laŭ kiu oni uzas la lingvon kaj admiras la firman konvinkon per kiu la Esperantistoj laboras por la paco. Li citas interalie vorton de estinta Direktoro de UNESKO, partopreninta la Parizan kongreson, Sinjoro Jean Thomas, pri la valoro de nia lingvo por la realigo de la paco. Koncerne la estontan diskuton pri Esperanto en UNESKO, la parolanto prudente atentigas ke ĉio dependas de faktoroj ekster la kompetenteco de UNESKO kaj ankaŭ de la Esperantistoj, sed li havas la konvinkon pri la bona iro de la afero.”

Longa aplaŭdo.

La Prezidanto de UEA varme dankas la parolinton kaj emfaze citas la altajn celojn de UNESKO.

Laŭ la tradicio de la kongresoj, sekvas la salutparoloj de la Landaj Asocioj, unuavice tiuj aliĝintaj al UEA. La prezidanto atentigas kaj substrekas, ke ĉiu rajtas paroli tri minutojn kaj ke okaze de malrespekto al tiu ĉi regulo, li estos devigata haltigi parolanton :

Parolas nun la delegitoj de

Aŭstralia Esperanto-Asocio : F-ino L. Samblebe.

Reĝa Belga Ligo Esperantista : Sinjoro J. Hérion.

Flandra Ligo Esperantista : Sinjoro C. Tousseyn.

Brita Esperantista Asocio : Sinjorino M. Kennedy.

Centra Dana Esperantista Ligo : Sinjoro G. Kühlmann.

Unuiĝo Esperantista Franca : Sinjoro H. Philippe.

Itala Esperanto-Federacio : Sinjoro G. Saggiori.

Jugoslavia Esperanto-Federacio : Sinjoro P. Zlatnar.

Nederlanda Esperanto-Asocio LEEN: Sinjoro P. M. Mabesoone.

Norvega Esperantista Ligo : Sinjoro H. Karterud.

Sveda Esperanto-Federacio : Sinjoro Einar Dahl.

Svisa Esperanto-Societo : Sinjoro W. Laederach.

Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko : Doktoro W. Solzbacher.

Ilin sekvas la parolantoj de landoj : Aŭstrujo : Doktoro Frenzel.

Finnlando : D-ro L. I. Lappi.

Germanujo : Sinjoro H. Michling.

Indonezio : Sinjorino Datoe Toemenggoeng.

Izraelo : Sinjoro D. Engelscher.

Ĉiuj parolantoj parolis afere, aludante jen tiun aŭ alian okazaĵon.

La Prezidanto de UEA transdonas la salutojn de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, kaj de Heroldo. La tempo ne permesas ke estu pliaj alparoloj de aliaj organizaĵoj, kiuj salutos en la Unua Ĝenerala Kunveno. Sinjoro Malmgren memorigas ke dum la Unua kaj jam legendara kongreso en Bulonjo-sur-Marco aperis junulo kies variaj kapabloj kaj talentoj devis poste grave influi nian movadon. Tiu ĉi junulo tiama nun festas sian 50-jaran jubileon en la Movado kaj hodiaŭ parolos al ni. Estas

Doktoro Edmond Privat.

La prezidanto transdonas al li la parolon por la festparolado.

Por raportisto estas ĝuo, vera ĝuo, spirita plezuro, aŭdi nian unuan oratoron kaj eminentan homaranon. Kaptita de la bela lingvo, de la altaj ideoj kaj de la sincera konvinko per kiu Doktoro Privat prezentas ĉion, oni forgesas sin kaj ne sekvas lin skribante. Tial la nuna resumo nur redonas malperfekte tion, kion diris la oratoro.

Doktoro Privat salutas la urbon Zagreb kiun li vizitas nun la trian fojon, la unuan en 1915, sub la ombro de la milito, la duan en 1936 kaj la

trian fojon nun, en la restarigita Kroata Popola Respubliko. La du militoj kiujn trapasis tiu ĉi lando, detruis multajn valoraĵojn ne facile kaj rapide rebonigeblajn. Li memorigas la momenton kiam en 1915 li kaŝe vizitis maljunan Esperantistinon (la polico tiama ja ĉion suspektis, precipe ĉiun kiu venis el eksterlando); li memorigas je granda amiko de nia afero, la fame konatan Stepan Radić, tiom energie pledinta por Esperanto en Genève. Hodiaŭ tie ĉi en Zagreb li ĝojas pri la atingaĵoj sociaj kaj la grava laboro plenumita por rekonstrui ĉion.

Observanto de nia kongreso konstatas kun kioma facileco la kongresanoj sin esprimas, diskutas, babilas kaj sin komprenas. Tiun ĉi animon, tiun ĉi naturon, neniam povos redoni tradukisto eĉ la plej lerta, en manifestacioj plurlingvaj. La tekniko tiom progresinta ja metas al la dispono de la homoj komplikajn aparatojn por aŭdi tion kion oratoro diras. Lertaj tradukistoj kun timiga rapideco tradukas tion. Ĉio tio estas ja grandioza de teknika vidpunkto, sed mankas *la animo*; mankas la rekta rilato de parolanto al aŭdanto. Tia tradukado estas enuiga, malŝpariga kaj fine teda. Se ni nun rigardas nian movadon, kiu ne disponas je gigantaj rimedoj, kiu devas prediki al la homaro la utilon de Esperanto, la facilan lernadon, la jaman uzadon, tiam ni danke kaj respekte devas konstati ion; nome ke ĉio tio estas kreita de homoj plejparte simplaj, malriĉaj, sed serĉantaj. Serĉantaj ion kio plenigas ilian vivon, kio donas al ĝi ion ne troveblan alimaniere: kontakton kun la aliaj, kun la fremduloj. Ĉi tiujn homojn ni trovas pli multe tie ĉi en la Federacio de respublikoj sudslavaj.



[Foto: Bronko Luš]

Parolas D-ro Privat

Esperanto estas la latino de la demokratio. Tion diris fama Esperantisto, Rektoro Boirac, kaj la evoluo de nia movado lin pravigas. La monopollo de homoj el posedantaj klasoj, kies riĉeco permesis al ili lerni fremdajn lingvojn kondukis al speco de aroganteco, de malŝato pri aliaj, kiuj ne povis tion fari, aŭ faris ĝin pro devigo de vivgajno, ofte per grandaj oferoj. Kiom ofte ni renkontas tiajn intelektulojn fierajn pri lingvosciokaj malŝaterigardantajn nian penadon, havigi al la mondo facilan ilon de tuja interkompreniĝo lingva kaj . . . spirita, anima. Sed la homo sur la strato, "the man in the street", posedas ion alian. Liaj konoj estas amo kaj sperto de la vivo, kio pezas multe pli ol la akirita scio de la intelektulo. Kaj la homo sur la strato formas la grandan amason.



Mason Stuttard
Konstanta Kongresa Sekretario

Ĝi havas la rajton paroli. Dufoje oni ĵetis nin en la turmenton ; estas al ni postuli ke vi respektu tion kion ni ĉiuj volas—

la pacon.

Tiun ĉi homecon ni renkontas ofte en okazo neatendita : Jugoslavaj militkaptitoj helpataj de italaj kamparanoj por rifuĝi Svislandon. D-ro Zamenhof flegis okulojn ne de princoj, sed de malriĉaj mizeraj homoj malesperintaj. Ne gravas la koloro de la haŭto, ĉu blanka, ĉu ruĝa, ĉu nigra, aŭ flava : ĉiuj estas homoj kun sama rajto kaj samaj devoj. Iom

antaŭ la unua milito la granda franca popoldefendanto Jean Jaurès promenis en Brusela bildgalerio admirante Rubens. Demandite de amiko, kial en tiu ĉi jam danĝera momento li estas tie ĉi, Jean Jaurès respondis serene : “Mian tutan vivon mi donis por ebligi al laboristoj vidi tiajn artaĵojn”. Lin similas Zamenhof kiel okulisto kaj homarano. En profesio, kiel en la lingvo de li kreita, li volis nur unu celon : helpi al ĉiuj por povo preni manon de la aliulo en konkordo.

Doktoro Privat avertas : Se ni staras nun antaŭ granda versimileco de ia sukceso, ni tamen ne forgesu unu gravan ĉiam direndan fakton : Ĉio dependas de ni mem, de nia agado kaj en tiu ĉi vico, de nia povo gajni la junularon por nia idealo. Ni scias ke ni tenas la veron en la mano, ĝi ebligas al ni elteni kaj labori. Kunportu de tiu ĉi kongreso novan freŝan entuziasmon, kuraĝon kaj fidon en la bono de nia afero.

Seninterrompa aplaŭdo dankis la varmkoran oratoron, la unikan Privat, fiereco de nia movado.

La tagordo finiĝis. Kaj eksonis la himno entuziasme kantita de preskaŭ du mil ĉeestantoj.

La ĝeneralaj kunvenoj de UEA

Malfermas la unuan ĝeneralan kunvenon de UEA la Prezidanto de UEA, lundon, 27an de julio, je la naŭa matene. Ĉeestas la kunvenon ĉ.600 kongresanoj. La tagordo indikas : Legon de telegramoj kaj leteroj ricevitaĵ ; Salutojn de gravaj Esperanto-organizaĵoj ; Raporton de UEA ; Raportojn de Fakaj Asocioj.

Sendis telegramojn aŭ leterojn kun bondeziroj : Generalo Bastien, S-ro

Hans Kürsteiner, Honoraj Prezidantoj de UEA ; D-ro Kempeneers, Viceprezidanto de UEA ; Prof. D-ro Ivo Lapenna, Estrarano de UEA ; Akademiano Henriko Fischer ; Komitatano Tibor Sekelj ; D-ro Anakreon Stamatiadis, Ateno ; kaj multaj aliaj organizaĵoj kaj individuoj.

Estas la vico de Esperantistaj Institucioj kaj kiel unua parolas Ing. Isbrucker, kiel prezidanto de la

Esperantista Akademio. Mallonge li skizas la laborojn de la Akademio, kaj invitas la ĉeestantojn partopreni la publikan kunvenon de la Akademio je merkredo, 29an de julio.

Transdonas la salutojn de la Skolta Esperantista Ligo D-ro Halbedl. Lin sekvas F-ino Marianne Vermaas, Rotterdam, parolante por Universala Ligo kaj invitante je la okazonta kongreso de federalistoj en Kopenhago, fine de aŭgusto.

Ekprenas la parolon Estrarano de UEA, Sinjoro Oliver, por komenti la Jarraporton de UEA. Li skizas la laborojn de la Estraro, de la oficeja stabo, tuŝas la senfinajn komplikaĵojn pri la financoj, pentras la idealon de farindaĵoj kaj la realaĵon de fareblaĵoj. Spite la ĉiam streĉan kas-situacion (disponi je taŭga momento pri la enkasigitaj kotizoj) la jaro 1952 finis sendeficite danke al severa atento je ĉiu detalo.

Post la konciza komento de la jara raporto la Prezidanto malfermas la diskuton. Petas la parolon D-ro Halbedl por danki la Estraron de UEA pri la atingita rezultato tute kontentiga. Pledas energie por *unueca* organizaĵo esperantista en UEA, kiu grupigu ĉiujn ekzistantajn organizaĵojn inkluzive SAT, IKUE k.a. Li admonas plie ke ĉiuj varbu novajn membrojn por ke UEA estu forta, multnombra kaj ke ĝi povu plenumi la multajn taskojn de la nuna tempo. Sekvis varma aplaŭdo.

Respondas lin la Prezidanto de UEA pri la deziro krei kompletan organizaĵon unuecan. Sinjoro Malmgren atentigas ke la diversaj organizaĵoj cititaj havas diversajn celojn, neniel kunigeblajn en unu. Rilate je kunlaboro inter ĉiuj, UEA havas kontraktan interkonsenton pri servoj kaj komuncelaj aranĝoj kun



Ivo Rotkvic : L.K.K.-ano

la plej gravaj Esperanto-organizaĵoj, interalie kun SAT. Tiu ĉi kontrakta interkonsento funkcias tute kontentige kaj sufiĉas. Pri la unueca kongreso oni jam skribis; estas deziresprimo kiu, se oni volus realigi ĝin, renkontus tuj en la komenco nevenkeblajn malfacilaĵojn. Jam nun nia kongreso konas tiajn; ni pensu nur pri la loĝado de preskaŭ dumil kaj eventuale pliaj miloj da personoj dum turisma sezono.

Kompreneme la ĉeestantaro kvitancas per aplaŭdo la parolojn de la Prezidanto. La raportanto kompletigas tion per la poeta vorto: "Facile kunordiĝas la pensoj, sed krude kunpuŝiĝas en la spaco la objektoj."

Petas la parolon Sinjoro Mehmed Jakupović demandante pri la heredaĵo lasita al UEA en 1920 de ĝia fondinto. Je tio respondas Estrarano Hans Jakob, substrekante ke pri tio aperis regule raportoj pri konsisto, administrado, revizio k.t.p. Dum ses jaroj ĉi tiuj raportoj troviĝas en la Jarlibro de UEA, dua parto, sub la kalkuloj de la Serva Centro.



Zvonko Rehoric : L.K.K.-ano

Neniu petas plu la parolon pri la jara raporto de UEA. Estas nun la vico de la fakaj asocioj kaj kiel sola parolas Sinjoro Einar Dahl, por Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kiu kalkulas nun 1814 anojn kaj plurajn landajn sekciojn. Rimarkigas ke ILEI estas rekonita kiel organizaĵo faka, neregistara (neoficiala) inter la privataj organizaĵoj tutmondaj en UNESKO. (*Aplaŭdo*).

La tagordo elĉerpita, neniu petas plu la parolon; la Prezidanto fermis la unuan kunvenon ĝeneralan je la deka horo.

* * *

La dua ĝenerala kunveno de UEA okazis je vendredo, 31an de julio. Prezidis Sinjoro Ernfrid Malmgren. Salutis la kongreson ankoraŭ kelkaj organizaĵoj kaj izolaj Esperantistoj. Sekvis la konigo de la raportoj de la Sekcioj, de la fakaj asocioj k.a.

Raportis sinsekve pri unua, dua kaj tria Sekcioj Profesoro Sirk, Sinjoro Oliver kaj Sinjoro Minnaja. La rezolucio de la unua Sekcio, legita de Prof. Sirk, estis aklame akceptita; dume la du ceteraj restas ĉe la Estraro de UEA por plia ekzameno.

Blinda samideano Karlo Muhar raportis pri la samtempe okazanta kongreso de la blinduloj-esperantistoj, kiun partoprenis ĉirkaŭ 50. Sinjoro Einar Dahl raportis pri la kunveno de la 150 instruistoj, atentinda nombro. La prezidanto de la Akademio, Sinjoro Ing. Isbrucker, informis pri la kunvenoj, publika kaj nepublika, de nia lingva aŭtoritato. Ankaŭ la kvakeroj (Societo de Amikoj) aŭdigis sian voĉon pere de Sinjoro Tucker. Pri la fervojista kunveno Sinjoro O. Walder donis la komentojn, informante ke la kunvenon partoprenis la staciestro kaj la ĉefo de la lokomotivejo de Zagreb. Fine la Internacia Scienca Asocio Esperantista, pere de Sinjoro Popović, informis pri kunveno dum kiu oni ĉefe diskutis la fakvortarojn. Estas preparata dokumento pri la uzo de Esperanto en scienco por transdono al UNESKO.

Je la fino de la raportado, la Prezidanto, dankinte la raportintojn, petis D-ron Privat diri siajn impresojn pri la evoluo de niaj kongresoj. D-ro Privat, komparante pasintajn kongresojn kun la lastaj postmilitaj, ĝoje konstatas la pacigan atmosferon regantan, ĉefe ŝuldatan al la difinitiva foresto de organizaj kvereloj. Ni dankas tion al la nunaj gvidantoj, precipe al la nuna Prezidanto, Ernfrid Malmgren (kies antaŭnomo jam atestas la paceman karakteron). Grava problemo stariĝas pri la posteuloj kaj estas nia tasko trovi junajn talentojn por anstataŭi la eksigantajn kaj maljuniĝontajn. Laŭ D-ro Privat la kongreso en Zagreb estis mirinda (ĝenerala opinio de la kongresanoj). De ne-Esperantistoj oni povis aŭdi nur laŭdajn vortojn kaj efektive tian kongreson oni neniam konis en Jugoslavujo.

Donante ankoraŭ kelkajn konsilojn praktikajn pri la organizo de teknikaj konferencoj kaj la informado, precipe rilate je UNESKO, li finis.

La Prezidanto esprimis sian dankon al D-ro Privat kaj finis per frazo el salutletero de Prof. Ivo Lapenna :

Insiste kaj senkompromise antaŭen !

Inaŭguro de la Zamenhof-Strato

Kulminacia punkto de la kongreso fariĝis la inaŭguro de la Zamenhof-strato, kroatlingve *Ulica Dr. L. L. Zamenhova*. La urba aŭtoritato elektis unu el la plej belaj stratoj, vilaokvartalo, larĝa, bela strato. Mardon, je la deka horo, kolektiĝis milo da kongresanoj. La urbestro de Zagreb, starante sur podiumo, alparolis la kongresanojn, konfirmante la altan intereson por Esperanto kaj ties popol-interliga rolo. Liaj trafaj vortoj estis frazo post frazo libere tradukitaj de D-ro Borovečki senhezite kaj senmanke, kio videble impresis la publikon. Je la fino de la enkonduka parolado, la urbestro deprenis la verdan flagon, kiu kovris la bluan ŝildon kun la indiko :


Ulica Dr. L. L. Zamenhova

Entuziasma aplaŭdo dankis oratoron kaj tradukinton. Spontanee eksonis la himno, kantado direktita per la forta voĉo de Einar Dahl, la norda bardo ! Impresa ceremonio, jam tradicia ero de la universalaj kongresoj.

* * *

Distraĵoj

Pri manko de distraĵoj oni vere ne povis plendi. Distraĵoj ni diras, ĉar estis altkvalitaj aranĝoj kaj okazaĵoj. La ekskursoj al Plitvice kaj al



Emilija Lapenna : L.K.K.-ano

Samobor, esence malsamaj eroj de la kongreso, rikoltis nur laŭdojn. Pri Samobor, regis ĝenerala kontentiĝo pri la vere amika akcepto en tiu ĉi simpatia urbo. La lagaro de Plitvice ja estas tiom grandioza naturbelaĵo, ke kontraŭ ĝi oni povas lokigi nur la grotojn de Postojna, de sama sed alispeca grandiozeco.

La folkloraj aranĝoj, dancoj, ĥorkantoj paralelis kun la naturbelaĵoj. *La Arta Vespero* en kongresejo (lundon, 27an de julio) respondis je ĝia titolo centprocente. *La vespero de jugoslava muziko* estis tiom impresa kaj kaptiga ke neniu kiu ĉeestis forgesos ĝin. La samon oni povas diri pri la *Vespero de popoldancoj* (29an de julio).

La kongresa balo por la unua fojo okazis en plena aero, sur la teraso de Hotelo Esplanade. Multaj kostumoj enlandaj kaj alilandaj, montenegraj, serbaj, kroataj, svedaj, nederlandaj, svisaj, multkolora pentraĵo. Kiel Princo de Ligne diris pri la fama kongreso en Vieno ni same povas diri : “Le Congrès s’amuse”, t.e., “La kongreso amuziĝas”. Post tiom da laboro kaj atento, senstreĉiĝo estas saniga.

Oficiala akcepto de la Urbestro de Zagreb

La urbestro de Zagreb, Sinjoro Većeslav Holjevac, bonvolis inviti centon da personoj je oficiala akcepto en la Urba Palaco, en la supra parto de la urbo. Belega aranĝo, amika interŝanĝo de paroloj inter Urbestro kaj la prezidanto de UEA. Digna akcepto.

* * *

Aliaj Aranĝoj

Citinda inter la aliaj aranĝoj estas prelegoj. La spaco ne permesas fari komenton. Sub titolo *kulturaj prelegoj* oni povis aŭdi:

Pri Zagreb: Sinjoro Marinko Gjivoje.

Jugoslavujo, lando kaj popolo :
D-ro Ivo Borovečki.
La jugoslava literaturo : Sinjoro
Ivo Rotkvić.

* * *

Diservoj

Ekster la kongresa programo okazis diservoj katolika kaj evangelia. Paroĥestro Bergweiler celebris meson en monaĥina preĝejo, Frankopanska strato, kun prediko kaj kantoj.

La protestantoj kunvenis dimanĉon, 26an posttagmeze en Evangelia preĝejo, Gundulić strato. Pastro Hoppe predikis. Ambaŭ diservoj estis multnombre vizititaj.



Ferma Kunsido

Sabato, 1a de aŭgusto

La fino kronas la verkon ! Ankaŭ la plej bela kongreso devas fini, kaj kun ia bedaŭro la kongresanoj eniras la kongresejon por la ferma kunsido. Je la naŭa horo, Prezidanto Malmgren per enkondukaj vortoj prezentas la tagordon. Li transdonas la parolon al Estrarano Kennedy por resume informi pri la laboroj de la Komitato de UEA, la kunvenoj dum la kongreso, la labormetodo per ses Komisionoj, kaj deko da detaloj teknikaj-administraj.

La Prezidanto informas pri la elekto de la nova Estraro de UEA. Ĝi konsistas por la periodo 1953-1956 el :

Prezidanto : Ernfrid Malmgren


Vicprezidanto : David Kennedy

Redaktoro : Hans Jakob

Estraranoj: D-ro Paul Kempeneers,
Prof. D-ro Ivo Lapenna, Arthur
C. Oliver, Jean Guillaume.

(forta longdaŭra aplaŭdo).

La Prezidanto skizas la estontan laboron, atentigas pri la grava afero



en Zagreb

[Foto: Lozovina Milivoj]



Jelena Manojlovic : L.K.K.-ano

de UNESKO, kaj fine petas D-ron Borovečki legi la rezolucion akceptitan :

“La 38a Universala Kongreso de Esperanto apelacias al la naciaj kaj internaciaj oficialaj instancoj serioze konsideri la praktikan valoron de Esperanto kiel internacia komprenilo. Kun kontento ni registris la intereson pri Esperanto de UNESKO kiu al la Zagreba kongreso sendis observanton. Ni atendas, ke la koncernaj aŭtoritatoj en la diversaj membroŝtatoj de UNESKO plej detale kaj sen antaŭjuĝo esploru la jam atingitajn rezultojn kaj la eblecojn de la lingvo, kaj ke ili faru al UNESKO konkretajn proponojn por la utiligo de ĉi tiu plej valora kaj praktika solvodela monda lingvo-problemo”.

Sekvas raporto pri la **oratora konkurso**, prezentita de Sinjoro Rotkvić. Forte aplaŭdita, li konigis la nomojn de la gajnintoj :

1. Nicola Minnaja ; 2. Bruno Graf ;
3. Ludoviko Salkareŝ.

Se la oratora konkurso ne povis altiri pli da interesuloj, la **belartaj konkursoj** konis ampleksan parto-

prenon. Laŭ la raportinto, la kvalito ĝenerale estas bonega. Plej grandan sukceson havis la skotaj partoprenintoj. Premiitaj estis :

Originala Poezio

1. El “La infana raso” de William Auld.
2. “La soleca dio” de John S. Dinwoodie.
3. { “Renkontiĝo” de Eli Urbanova.
“La granda aventuro” de John S. Dinwoodie.
5. “Matena Distriĝemo” de Poul Thorsen.

Traduka Poezio

1. Antaŭparolo de “La Virino el Bath” (Chaucer) de William Auld.
2. “Eltenu, mia kor’ ” (A. Lang) de John S. Dinwoodie.
3. “Admono al junulinoj” (Montgomerie) de John S. Dinwoodie.
4. “Lasta preĝo” (Ada Negri) de Luigi Minnaja.
5. “La ministro” (H. Ibsen) de Henry Fridén.

Originala Prozo

1. “Senhejmulo” de R. J. French.
2. “La Limo” de Jolanthe Leser.
3. “Portreto de poeto” de Marjorie Boulton.
4. “La Kaptilo de Dio” de Marjorie Boulton.
5. “La Sorĉisto” de Ŝtepan Urban.
6. “Mensog’ nia ĉiutaga” de Takač Zeljko.
7. “Ferioj kun la muzo” de Ŝtepan Urban.

Originala Dramo

1. { “La Sinjorino kiu kredis” de
Gerald C. Jervis.
“Kvazaŭ birdoj konstruas” de
William Auld.
3. “La reaĉeto de princo” de Marjorie Boulton.

Deklamado

1. Karlo Minnaja : "Estas mi Esperantisto" de Baghy.
2. Radmila Sakaĉ : "Ĉe Lesboso" el "La Tajdo" de Hohlov.

Jam oni sentas alproksimiĝi la finon de la kongreso. La Prezidanto donas la parolon al Sinjoro Mabesoone por la invito al Haarlem.

Sinjoro Mabesoone klarigas la neeblecon kongresi en Hago aŭ en alia pli granda urbo nederlanda, pro la turisma alfluo de fremduloj dum julio-aŭgusto. La inaŭguro de la kongreso okazos en Amsterdam, facile atingebla de Haarlem. Atentigante ke ankaŭ Nederlando havas siajn naturbelaĵojn, li diris ke la Esperantistoj havos okazon vidi la polderojn, la kanalojn kaj povos kompreni la konstantan batalon de la homo kontraŭ la maro. Variante la diraĵon francan : "La reĝo mortis, vivu la reĝo !", li diras : "La Kongreso mortis, vivu la Kongreso ! Vi ĉiuj estos bonvenaj en Haarlem".

Kaj venas la tradicia dankesprimo flanke de la Prezidanto de la LKK, D-ro Borovečki. Li sin turnas al la kongresanoj kaj dankas pro la fido montrita per ilia multnombra ĉeesto. Li citas la laborojn de la LKK, de ĉiuj anoj, de la Vicprezidantoj kaj al ĉiu unuopa LKK-ano, fine ankaŭ al la Aŭtoritatoj tiom malavare nin subtenintaj. Specialan dankon li adresas al la Konstanta Kongresa Sekretario, S-ro Mason Stuttard, kiu ne nur administris, sed propagandis, vizitis grupojn, unuvorte refortigis la entuziasmon. Longa forta aplaŭdo pruvis, ke la vortoj de la LKK Prezidanto respondis al la sentoj de la kongresanoj : Bone aranĝita kongreso.

Apartan dankon kun floroj kaj kiso rikoltis la simpatiaj kunlaborintinoj



Marinko Gjivoje : L.K.K.-ano

en LKK, samideaninoj Lucija Borčić, Jelena Manojlović kaj Emilija Lapenna.

Prezidanto Malmgren siavice esprimas la elkoran dankon de la Komitato kaj Estraro de UEA al la LKK-prezidanto kaj liaj kunlaborantoj.

Li aludas la ĉeeston de la delegito de UNESKO, Sinjoro Lebar, kiu partoprenis kunvenojn de la Komitato kaj povis konstati kiel funkcias la lingvo en afera kunsido. La konstatoj de la delegito de UNESKO estos multvalora faktoro por la estonto.

Daŭrigante, Sinjoro Malmgren memorigas ke tiu ĉi kongreso estis la unua en sudorienta Eŭropo, precipe tie, kie Esperanto povas utili plej multe pro la multlingveco. Estas tutcerte, ke tiu ĉi kongreso havos gravajn sekvojn tiom enlande kiom alilande. Li finas per la admono : Kunportu entuziasmon, havu kuraĝon kaj konservu fervoron.

Aplaŭdo.

La parolo estas al la redaktoro de "Esperanto", kiu en la nomo de la Estraro de UEA dankas al la



Josip Vajdlih : L.K.K.-ano

Prezidanto de UEA pro lia modela gvido de la aferoj, liaj pacienco kaj sindono. Li memorigas je la edzinoj de la komitatanoj restintaj hejme kaj dankas ilin pro kompreno kaj indulgo, sekve de la foresto de la edzo dum feria tempo. Al la edzinoj de ĉeestantaj Estraranoj, Sinjorino Malmgren kaj Sinjorino Kennedy, venas la lasta dankesprimo akompanata de ruĝaj rozoj.

La tradicia kanto de la himno signis la finon de la 38a.

Nova devizo : Ek al Haarlem 1954.

La Somera Universitato

Estas malsimpla tasko skribi pri la prelegoj de la Somera Universitato. Por detala raporto mankas la spaco kaj konciza priskribo iĝos sensuka resumo. La raportanto limiĝas je ĝenerala impresoj gajnita dum ĉeesto de pluraj prelegoj, kaj la komentoj aŭditaj flanke de la kongresanoj.

Dulingva programo antaŭinformis la "studentojn" pri prelegoj kaj profesoroj. Honora protektanto de la Somero Universitato estis la rektoro de la Zagreba Universitato, **Prof. D-ro Teodor Variĉak**, kiu per formoplena alparolo en flua Esperanto malfermis dimanĉon, 26an de julio, la sesan laborperiodon de la I.S.U. En sia enkonduka parolado, Profesoro Variĉak rememorigis pri scienculo kaj kompetenta lingvisto kroata, Akademiano Tomo Maretić, kiu je la 10a de decembro 1891 prezentis tezon pri la problemoj de internacia lingvo al la Akademio de Scienco kaj Artoj en Zagreb. La titolo de tiu ĉi tezo

estis: "Pensoj pri la artefarita mondlingvo". Li jam konfirmis tion, kion ni ĉiuj akceptas, ke neniua nacia lingvo povos plenumi la rolon de "internacia" lingvo. Liaj argumentoj estis, sen scio pri li, alprenitaj de ni jardekojn poste. El liaj konstatoj ni citu nur: "Ne estas dubo, ke la neŭtrala mondlingvo glatigus inter unuopaj popoloj multajn kverelojn kaj miskomprenojn ĉar ili plej bone ekkonus unu la alian, kaj ĝuste en tio kuŝas unu el la plej grandaj bonfaroj de la mondlingvo."

Akademiano Maretić konis Esperanton kaj konfesis, ke ĝi prezentis en sia strukturo valorajn elementojn, necesajn por tielnomata sinteza lingvo.

Forta aplaŭdo dankis la oratoron pro tiu ĉi rememorigo je sendependa kaj kompetenta scienculo-lingvisto, kies konkludoj tiom kontrastas je aliaj Akademianoj nuntempaj, proponantaj kiel solvon la "bilingvismon".

Je sama vespero, prelegis **D-ro Edmond Privat**, Profesoro ĉe Universitato de Neuchâtel, pri Usona kaj Svisa federalismo. Sprite kaj humore, spicita per anekdotoj kiel estas la manĝaĵoj en Zagreb per papriko, sed ĉiam en la limo tolerata, tiel la unua oratoro Esperantista prezentis sian temon. Preterpasis antaŭ niaj okuloj, preskaŭ kapteblaj, la figuroj de la ŝipo "Mayflower", la nemortopovaj pilgrimpatroj, ĉi tiuj pioniroj de la nova kontinento, neflekseblaj principfirmaj homoj, individualistoj ekstremaj. Ni sekvis la fazojn de la sendependiĝo, la longa milito inter la Brita armeo disciplinita kaj la milico starigita de George Washington. La sendependiĝo gajnita, venis la momento de la konstituiĝo, la redakto de la "Konstitucio de la Unuigitaj Ŝtatoj" de 1787. Tiu ĉi politika dokumento ankoraŭ nun estas fundamenta leĝo senŝanĝa kaj ĝi klarigas multajn aferojn, por ni kelkfoje nekompreneblajn. Ĝia ĉefa karakterizaĵo estas la duĉambra parlamento (Congress), la Supera Tribunalo kaj la kunigo de la ekzekutivo en unu mano, de la Prezidanto, apud kiuj la respondecaj ministroj estas nuraj "sekretarioj". Estas la ideoj de la ĝenevano Jean-Jacques Rousseau kiuj troviĝas en tiu ĉi dokumento. Sed kia vojo por atingi fine la akcepton per la unuaj dektri ŝtatoj, la tielnomitaj Nov-Anglujo-ŝtatoj? Tiam formiĝis la du partioj, kiuj ankoraŭ nun ekzistas sub sama nomo: La Respublikanoj (komence aristokrata-patricia-nobela) kaj la Demokratoj (Etbienuloj, komercistoj k.a.). La preleginto montras per ekzemploj bonege elektitaj, kiom potenca estas surpapere la prezidanto, kaj kiom li devas batali por akceptigi gravan



Franjo Vokoun : L.K.K.-ano

leĝon. La granda zorgo de la patroj de tiu ĉi konstitucio estis eviti regadon diktatoran kaj tiel ili ĉirkaŭis ĉiun paragrafon per protektaj aldonoj, praktike katenigante la povon de la ŝtatestro je minimumo.

De la kolosa Usono, ni saltu al malgranda Svislando, tute alia speco de federalismo kies stariĝo venas el la tempo de feŭdalismo. Ankaŭ la svisa konfederacio devis trairi plurajn formojn de ŝtateco. De la nura ligo de sendependaj ŝtatoj, kiuj de tempo al tempo interkonsentis pri komuna agado kontraŭ avidaj najbaroj, ĝis la nuna firma ŝtatformo estis longa vojo. La nuna konstitucio svisa baziĝis en pluraj rilatoj sur la usona. Enestas alia ideo de Rousseau, tiu pri la ekzekutivo de malgrandaj ŝtatoj, konfidataj al kolegaro de pluraj personoj. Sep viroj formas la registaron svisan el kiu unu por unu jaro prezidas. Ne estas malofte, ke svisa civitano eĉ ne memoras la nomon de la prezidanto dumjara. La ĉefaj elementoj de la svisa konstitucio estas la duĉambra parlamento: Nacia Konsilantaro, reprezentanta la popolon, kaj la ŝtata Konsilantaro, speco de senato, kiu



Marko Demetrovic : L.K.K.-ano

reprezentas la ŝtatojn, t.e. la kantonojn. Sed alia elemento, eble la plej grava, estas la rekta partopreno de la popolo en la leĝfarado per la iniciatraĵo, kaj la referendumo. La unua permesas al tridekmil civitanoj iniciati leĝon, la dua devigas la registaron en difinitaj okazoj, submeti decidon al la aprobo de la popolo.

La svisan ligon kaj ĝian fondiĝon romantike pentris Frederiko Schiller en *Vilhelmo Tell*. Kaj kiam ekflamas la fajro je la unua de aŭgusto sur ĉiuj montoj svisaj, la svisa civitano dankeme memoras la simplajn montaranojn, kiuj en 1291 ĵuris la eternan ligon de la tri prakantonj.

Riĉa aplaŭdo dankis la preleginton, kiu dum 20 minutoj sciis kapti la atenton de la aŭskultantaro, malgraŭ la granda varmego reganta.

La dua preleginto de la vespero estis **G. Waringhien**, agregacia profesoro pri lingvistiko, profesoro de la Brita Instituto en Parizo. Lia temo estis aparte interesa por ni: "Esperanto kaj la Tradukarto". Multaj el la ĉeestantaj kongresanoj konas la preleganton per liaj verkoj,

tradukaj, memkompilitaj kaj aliaj. Ĝus nun aperis traduko lia de parto el la "Rubajtoj de Omar Kajam", persa poeto. Ja ne malmultaj kredas, ke traduki ion en Esperanton estas facila laboro, kaj nur tiu, kiu penas transdoni en nian lingvon ion valoran el nacia lingvo, konscias kiom klopodiga estas fakte tiu ĉi laboro. Tio ne nur koncernas Esperanton; ĉia traduko de unu lingvo en alian estas arto. Per aro da ekzemploj, la oratoro montris malicojn de la traduklaboro, respektive de la vortsencoj. Speciale instruiga estis la ekzemplo de tradukoj de tri diversaj tradukantoj, de la poemo de Henriko Heine "En nord' unu pino en solo". Kiel konkludo de la vere valora prelego, Profesoro Waringhien rimarkigis: "Ne traduku vortojn, sed la sencon". Varma senhalta aplaŭdo esprimis la dankon de la aŭskultantoj.

La ceteraj prelegoj de la S.U. kondukis la aŭskultantojn en diversajn branĉojn de la homaj scio kaj povo. **Profesoro Sirk**, Vieno, en tute scienca maniero, konigis "Kiel estiĝis la metra sistemo"; dume Sinjoro **Poul Thorsen** parolis pri la "Poezio de la eskimoj".

Sociologian temon pritraktis lektoro **R. H. Osborne**: "La ŝanĝiĝo de la distribuo de la loĝantaro en Britujo". La preleganto montris kiel la industrio, bazita sur karbo kaj fero, kreis dense loĝatajn centrojn tiel ke 80% de la loĝantaro nun estas en urboj. La kreo de la tielnomataj "konurbacioj" (komuneco de pluraj urboj) mildigas la sekvojn de la senbrida alfluo de novaj loĝantoj kaj ŝveliĝo de centroj.

"La universala genio de Dante"; jen temo neelĉerpebla, kiun elektis **D-ro V. Musella**. Ĝenerale oni pensas pri la ĉefverko de Dante "La Dia

Komedio" kaj preskaŭ ignoras aliajn, same gravajn, kiel "Vita Nuova", "Il Convivio", "De Vulgari Eloquentia", "De Monarchia", k.a. pri kiuj elokvente parolis D-ro Musella kaj retenis la atenton de la aŭskultantaro.

Magistro **William Auld** tuŝis gravan problemon prelegante pri la "Perspektivoj de la Esperanto-poezio". La poezio en Esperanto ne estas simpla adapto de la naciaj poezioj, sed io tute aparta, kies unuajn fruktojn ni konas. Pro ĝia sistema karaktero la internacia lingvo povas produkti aliajn formojn en la poezia arto. Kun la kreskanta nombro de Esperantoparolantaj homoj venos ankaŭ la talentoj, kun krea kapablo. La instrumento ekzistas; oni devas nur lerni ludi sur ĝi.

Estis bona ideo lokigi inter la prelegoj de la S.U. ankaŭ tian pri temo jugoslava. Docento Inĝeniero **Oton Pancer** sukcese prezentis tezon: "La ekonomio de la agrikulturo en Jugoslavujo", montrante ke per novaj metodoj la produktopovo de la agrikulturo estas altigota.

Magistro **Reto Rossetti** verve vivigis antaŭ la publiko la temon: "Britaj pentristoj de la 18a kaj 19a jarcentoj," pruvante ke li funde konas la materion.

* * *

Konklude: La Somera Universitato pli kaj pli evoluis kaj jam atingis altan gradon de perfekteco. Kio ĝenas, estas la samtempeco de du-tri prelegoj, pro kio estas al raportisto fizike neeble partopreni ĉiujn.

Tri monumentoj de la mondliteraturo

varme rekomendataj de la tuta Esperanta gazetaro pro la lingva perfekteco:

La Libro de la Spiritoj, de Allan Kardec, trad. de Porto Carreiro Neto.

Enhavanta 1018 demandojn kun detalaj respondoj pri ĉiuj problemoj de la homa vivo antaŭ kaj post la morto.

1 vol. 532-paĝa, bonega papero, broŝ. 10ŝ. 6p., afranko 9p.

La Evangelio laŭ Spiritismo, de Allan Kardec, trad. de I. G. Braga.

Ĝi estas la plej klara eksplikado de la kristana religio el vidpunkto spiritisma.

1 vol. 432-paĝa, broŝ. 8ŝ. 6p., afranko 8p.


Antaŭ du mil jaroj . . . de F. C. Xavier, trad. de Porto Carreiro Neto.

Historia romano pri la naskiĝo de Kristanismo kaj la Roma politiko de la 1-a jarcento de nia epoko.

1 vol. 400-paĝa, broŝ. 15ŝ., afranko 6p.

Mendu ĉe

**Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth,
Herts., Anglujo**



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Por somera tempo oni aldonu laŭ neceso—kutime 1 horon.
Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Lundo	21.35–21.40	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Mardo	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	18.00–18.20	Roma. 25.21m., 31.35m., 49.92m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vitorio Veneto 56.
	19.30–20.00	Madrid. 225m., 42.33m. P. Radio S.E.U., Sección Esperanto, Diego de León 49, Madrid, Hispanujo.
	21.45–22.15	Valencia. 43m. P. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m., 188m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	07.40–07.45	Lille. 218m. I. Prof. Labit, 1 rue St-Martin, Lille (Nord), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	23.05–23.20	Zagreb. 264.7m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	18.00–18.20	Roma. Kiel merkrede.
	22.15–22.30	Hilversum. 298m. P. (nur unu fojon ĉiumonate). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro, (DF), Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum Nederlando.

Nederlanda Radio. Jam de kelkaj jaroj la duobla stacio Hilversum dissendas Esperantlingvajn programojn prezentitajn de la radio-organizaĵoj katolika (K.R.O.) protestanta (N.C.R.V.) kaj socialista (V.A.R.A.). Ĉi tiuj elsendoj per mezlongaj ondoj estas facile kapteblaj per ĉiuj ordinaraj riceviloj en Nederlando, Belgujo, Francujo, Britujo, Germanujo kaj Svislando. El aliaj landoj pli malproksimaj de la sendilo ni ricevis neniun raporton.

Tamen tiuj paroladoj estas tro mallongaj ; du el ili daŭras kvin minutojn ĉiusemajne, la alia kvaronhoron ĉiumonate. Dum la pasinta jaro ni povis aŭdi muzikprogramojn prezentitajn en la nederlanda lingvo kaj Esperanto, sed tiu agrabla iniciato de V.A.R.A. bedaŭrinde ne havis daŭron nek imiton.

Bonvolu noti, ke leteroj al la stacio estos helpo kaj kuraĝigo al la organizantoj de la elsendoj.

Radio Roma. El la septembra programo : 16an. 25a Itala Kongreso de Esperanto, Solena Malfermo; 23an. 25a Itala Kongreso de Esperanto, Literatura Fakto (registritaj).

Marsalo Tito kaj Esperanto

Demandite dum la intervjuo donita al la Esperantista Delegitaro je la 4a de Junio (jam skize raportita en la Julia numero de *Esperanto*) ĉu li spertis lingvajn malfacilaĵojn en eksterlando, Marsalo Tito respondis, ke en Francujo estis iom malfacile ĉar oni tie ne inklinis paroli la germanan lingvon. “Rilate al lingvolernado mi tamen volas diri, ke Esperanto estas multe pli facile lernebla ol iu ajn alia lingvo. Mi opinias, ke la lernado de Esperanto nun estas tre aktuala. Scion de Esperanto oni povus en ĉiu lando utiligi.”

Parolante pri la situacio en Sovetujo kaj la “satelitaj” landoj, kiel ankaŭ pri la malfavoro por Esperanto en landoj de faŝismo, la Prezidanto diris: “Tio estas parto de ilia tuta politiko—plena izolado


de la mondo kaj tre akra kaj sistema batalo kontraŭ la tiel nomita “kosmopolitismo”, kaj ili rigardas ankaŭ la Esperantistojn kiel portantojn de tiu sama kosmopolitismo. La grandaj nacioj volas ke ilia lingvo superregu, sed Esperanto havas vere universalan karakteron. Ĉar ĝi havas evolukapablon ĝi havas estontecon ; ĝi estas tre utila afero.”

* * *

..... kaj pri mondpaco

“La ĝenerala monda situacio grade pliboniĝas, ĉefe pro la fakto, ke ekestas ekvilibro inter la fortoj de la orienta bloko kaj la okcidentaj potencoj, kaj ambaŭflanke oni evitas tro grandan akriĝon de la interrilatoj. Ni proksimiĝas al periodo de trankvilo, malgraŭ la armado. Ne minacas

Fino sur paĝo 270



D-ro V. Jovanovic, M. Stuttard, Marsalo Tito, D-ro I. Borovečki, P. Zlatnar



Nia Forumo

PAROLAS LA LEGANTOJ

Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Presigo de letero de korespondanto ne necese signifas ke U.E.A. oficiale subtenas la esprimitajn opiniojn.

Ankoraŭ pri UNO kaj UNESKO

D-ro Solzbacher opinias (*Esperanto*, Julio-Aŭgusto 1953, p. 229), ke en mia artikolo (*Esperanto*, Majo 1953, p. 153) mi “neniel sukcesis malpravigi la argumentojn” de lia artikolo, publikigita en “Amerika Esperantisto”. Pruvo: “atesto de aŭtoroj, kiuj havis pli bonan komprenon pri la spirito de Esperanto ol D-ro Lapenna.”

Nu, ni ne diskutu pri la pli aŭ malpli bona kono de la lingva spirito, sed ni vidu ankoraŭ iom kiel prezentiĝas la afero ekster tiuj subjektivaj asertoj.

(1) *Unuiĝintaj Nacioj*.—Apoge al sia tezo, ke la korekta formo devas esti *Unuigitaj Nacioj*, D-ro Solzbacher “citas la jenajn atestantojn”: Zamenhof, Kabe, Wüster, la aŭtorojn de Plena Vortaro kaj de aliaj bonaj vortaroj, kiuj uzis la formon *Unuigitaj Ŝtatoj* por—Usono! D-ro Solzbacher opinias, ke tio estas analoga kazo al tiu de *Unuiĝintaj Nacioj*. Trovi ian ajn analogion inter kiu ajn interŝtata organizaĵo kaj kiu ajn ŝtato signifas aŭ ne scii la sencon de la vorto “analogio”, aŭ kompreni nek la nocion de ŝtato (egale ĉu unueca, federacia aŭ alispeca), nek la esencan karakteron de interŝtata organizaĵo, kia estas la organizaĵo de *Unuiĝintaj Nacioj*. La menciitaj aŭtoroj, kompreneble, bonege konis la spiriton de la Internacia Lingvo. Ĝuste tial

ili uzis por Usono (federacia ŝtato) la korektan formon *Unuigitaj*. La saman formon oni devas uzi en ĉiuj vere analogaj kazoj. Male, en nia kazo, kiu havas absolute nenion komunan kun la nocio de ŝtato, estas uzenda en Esperanto la formo *Unuiĝintaj*. Ĉi tie temas—mi ripetas ĝin—pri libervola organizaĵo de sendependaj ŝtatoj, kiuj *unuiĝis* por atingi difinitajn celojn kaj kiujn neniu rajtas (jure) nek povas (fakte) devigi resti en la organizaĵo kontraŭ ilia volo. Tial en tiu ĉi kazo kaj en ĉiuj analogaj kazoj la korekta formo en Esperanto kaj en ĉiuj aliaj lingvoj, kiuj posedas la refleksivan formon (ekz. en la Turka kaj Araba—vidu la revuon *Esperanto*, Junio 1953, p. 192) kun la sama valoro kiel en Esperanto, estas *Unuiĝo* aŭ *Unuiĝintaj*. Cetere, se D-ro Solzbacher estus leginta nur ankoraŭ kelkajn liniojn sur la p. 489 de la Plena Vortaro (de li citita), li estus trovinta la formon *Poŝta Unuiĝo*, kiu, kompreneble, estas tute korekta por tiu ĉi kazo.

D-ro Solzbacher, ŝajnas al mi, ŝatas la argumenton de la aŭtoritato. Mi preferas la aŭtoritaton de la argumento. Tamen, escepte, mi akceptu lian metodon. En tiu ĉi kazo la rezulto estas la sama, ĉar se la atestantoj de D-ro Solzbacher ion pravas, ili pravas precize la malon de tio, por kio D-ro Solzbacher alvokis

ilin en la tribunalon de nia kolega diskuto.

(2) *UNo.* — Kompreneble, la mallongigo de *Unuiĝintaj Nacioj* povas esti en Esperanto nur *UNo*. Pri tio, tamen, ne temis. La demando estis kaj estas ĉu la mallongigo de *Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj* povas esti en Esperanto *UNO* (laŭ la Angla), aŭ *ONU* (laŭ la Franca), aŭ *OON* (laŭ la Rusa), aŭ ĝi devas esti *OUN* (laŭ la Internacia Lingvo). Mi ne deziras longe diskuti pri la korekteco de tiu formo. Mi nur ankoraŭfoje atentigas pri la ĝenerale konata fakto, ke tiu pli longa formo kaj ĝia mallongigo estas kutime uzataj ne nur en la taggazetoj kaj en la radioelsendoj, sed ankaŭ en universitataj prelegoj, en sciencaj verkoj kaj revuoj, eĉ en debatoj kaj oficialaj dokumentoj de *UNo* kaj de diversaj specialigitaj institucioj. Ekzemple la franca teksto (oficiala) de la Fina Akto de la 16-a de Nov. 1945, per kiu estis fondita *UNESKO*, parolas pri “*Charte de l’Organisation des Nations Unies*” (Ĉarto de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj). Eĉ en la *Ĉarto mem* de *UNo* oni plurfoje uzas la formon “Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj” (ekz. en la art. 2, 7 kaj 75 de la franca kaj rusa oficialaj tekstoj) aŭ nur “Organizaĵo” (kun majusklo) en la angla, franca, rusa kaj hispana tekstoj, verŝajne ankaŭ en la ĉina, kiun mi ne povis kontroli (ekz. art. 2, 4, 5, 56, 57 k.t.p.). Sekve, kvankam la nomo de la Organizaĵo estas “Unuiĝintaj Nacioj”, tamen *ne estas eraro* nomi ĝin ankaŭ “Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj”, kiel oni kutimas fari. Se, do, pro kiu ajn kaŭzo oni uzas ankaŭ en Esperanto tiun pli longan formon (kiel faris C.E.D. en unu el siaj komunikoj por la gazetaro ne hazarde

aŭ pro eraro, kiel erare pensas D-ro Solzbacher, sed tute konscie por konformiĝi al la *kutima* skribmaniero en la grandega plimulto de lingvoj), *tiam la mallongigo povas esti nur OUN*, ĉar tio estas la mallongigo de la *Esperanta* nomo, dum *UNO* estas mallongigo de la *Angla* nomo.

UNESKO.—D-ro Solzbacher diris: “Se la argumentoj de D-ro Lapenna estus pravaj, la Francoj devus skribi *OUNESCO*”. Fakte, se la Francoj elparolus la vorton tiel, kiel ni elparolas ĝin en Esperanto (nome *UNESKO*), ili tute certe skribus ĝin *OUNESCO*. Sed la Francoj elparolas ĝin “ineskê” (proksimume) kaj ĝuste tial ili skribas ĝin *UNESCO*. Tiel agas ne nur la Francoj, sed ĉiuj popoloj: la skribo respondas al la prononco (kaj inverse) *laŭ la reguloj de la koncerna lingvo*. En Esperanto la litero “c” estas prononcata kiel “c” kaj neniam kiel “k”. Ĉar la Esperantistoj prononcas la vorton “unesko” kaj ne “unesco”, tial en nia lingvo oni devas ĝin skribi *UNESKO*.

Tiu vorto, kiel jam klarigite, perdis la karakteron de mallongigo kaj eniris en ĉiujn lingvojn, ankaŭ en Esperanton, kiel memstara vorto. Tial ĝi estas tiurilate analoga al la vorto “kolĥozo” kaj ne al kategorio de Ĉerĉil (Churchill), Ŝajo-Palaco (Palais-Chaillot) k.a., kiel opinias D-ro Solzbacher.

En Esperanto oni povus skribi *UNESCO* nur en du kazoj: (1) se oni elparolus tiun vorton “unesco”, aŭ (2) se oni konsiderus ĝin fremda, nome fremda mallongigo de fremdlingva nomo. Por la unua eĉ D-ro Solzbacher, evidente, ne povas pledi. En la dua kazo oni devus ne nur skribi ĝin laŭ la koncerna alilingva ortografio, sed ankaŭ prononci ĝin tiel, kiel ĝi estas prononcata en tiu lingvo:

“*juneskou*” (proksimume). Same oni agas en analogaj kazoj: oni skribas Palais-Chaillot kaj oni prononcas “Palê-ŝajo” (proksimume), West End (“uest end”), Solzbacher (“sol-cbaĥer”) k.t.p.

Konklude: aŭ elparoli “unesko” kaj skribi *UNESKO*, aŭ skribi *UNESCO* kaj elparoli “juneskou”. Tria ebleco ne ekzistas. Se D-ro Solzbacher sukcesos konvinki la Esperantistojn prononci tiun vorton “juneskou”, tiam ni povos trankvile ĝin skribi *UNESCO* kiel fremdan vorton. Provizore—ĝis tio okazos—ni plue skribu ĝin *UNESKO*, kiel *postulas la ortografio—perfekta en sia simpleco—de la Internacia Lingvo*.

D-ro Solzbacher eble plue juĝos tion “barbaraĵo” kaj “nenecesa strangaĵo”, kiu malfaciligas al ni la laboron en iuj medioj. La Esperantistaro ne timu tiujn iom fortajn vortojn. Ĝi konsciu, ke kelkfoje malbona atestilo estas malbona ne por tiu, al kiu ĝi estas donata, sed por tiu, kiu donas ĝin.

*Prof. Ivo Lapenna,
Membro de la
Akademio de Esperanto.*

Pri la Kvaropo

Mi devas sincere danki W. Auld pro la rimarkigo, i.a. ankaŭ tial, ĉar li donis al mi okazon per tio denove tralegi la brilantan KVAROPO-n.

Rilate la du rimarkojn, senhezite mi konstatas, ke koncerne la duan rimarkon, t.e. la liston de la ne facile atingeblaj aŭ tute novaj vortoj, mia ekzemplo estis malĝusta, sed tiurilate mi iĝis viktimo de teknika akcidento. Mem la rimarko tamen validas kaj rapide farita listo donas la rezulton, ke ne multe malpli ol 10% de la listigitaj vortoj mankas. (La listo enhavas 105 vortojn). Mankas la jenaj vortoj el la listo: Loligo (166),

pterosaŭro (168), saŭraro (168), lemura (169, 170), lanĉas (171), karnivoro (188), stegosaŭro (188), rondaŭo (223). Per tio mi absolute ne volas diri, ke la vortoj estas superfluaĵ, aŭ ke ili ne estas por certaspeca publiko rekoneblaj, sed ili efektive ne estas en la *Plena Vortaro*, kaj ĉar la *Plena Vortaro* estas la sola vortlibro, kiu ĝenerale estas uzata, oni devas akcepti ĝin por bazo, eĉ kiam ĝi ne estas tute plena, eĉ se eble fakvortaro aŭ Wŭster enhavas la koncernajn vortojn.


Koncerne la menciitan satiran poemon mi vere ĝojas, ke amiko Auld ne pensis pri Baghy, kiel li mem diras, sed do malfeliĉa vortludo eĉ en du detaloj tuj direktis la atenton pri la nomo de Baghy: la titolo de la poemo estas “Insulo de fetiĉuloj” Julio Stringbag. Oni bone komprenas, ke la titolo estas groteskigo de la nomo kaj verko de Aŭgusto Strindberg, sed vidante la antaŭnomon de Baghy kaj la finon de la elpensita nomo oni ne povas ne pensi pri Julio Baghy, kies iama vortskermado kun Kalocsay ĝuste pri la temo “neologismoj” ankoraŭ vivas en la memoro de la literaturo. Tiuj du faktoroj gvidis miajn pensojn al la kredo de satiro kontraŭ Baghy, kaj eble mi ne estis la sola. Des pli agrable estas scii, ke la verkinto de la poemo same altetaksas Julion Baghy kiel ni ĉiuj.

F. Szilagyi.

Notoj de la Redakcio

1. La ilustraĵoj sur paĝoj 232–3 por la artikolo *Digoj, Polderoj kaj Inundoj* estis represitaj pro afabla konsento de la Nederlanda Ŝtata Informejo, al kiu ni dankas.

2. La foto sur paĝo 216 estas farita de S-ro A. D. Debenham, al kiu ni ŝuldas dankon.



Tra la Libraro

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

*La recenzinto estas libera en sia prijuĝo de verkaĵo.
Lia opinio ne ligas la Asocion aŭ la Estraron de U.E.A.*

***Fingrulino.** Laŭ Hans Chr. Andersen. Bildoj : Gerda Born. Eldonis : Eldonejo Waldheim, Eberle, Vieno. 18 p., 14.5 × 12.5 cm., 2ŝ. 6p.

Unu el la plej grandaj malfaciloj en la edukado de Esperanto-parolanta infano estas la manko de taŭga legmaterialo. Kiam Paĉjo venas hejmen iom laca en la vespero kaj la infanoj postulas historion, la kompatindulo devas (se li ne havas tre fekundan fantazion) legi el nacilingvaj verkoj, mense tradukante ilin—iom streĉa tasko post la taga laboro. Jam aperis kelkaj verketoj, kiuj celas forigi ĉi tiun mankon, sed ĉi tiu libro estas la plej bona, kiun mi ĝis nun vidis. La preso kaj bindo estas bonegaj kaj la koloritaj ilustraĵoj estas tute ĉarmaj. Rilate la intereson de la historio por infanoj, mi nur povas diri, ke mia kvarjara fileto petis ĝian legadon tri noktojn sinsekve.

Estas malmulto en ĝi, kiun mi povas kritiki, sed kelkloke la stilo fariĝas iom peza pro la uzo de kunmetitaj tempoj. Ĉu oni vere bezonas ilin ĉi tie ? “Neniam plu ŝi estus vidonta la sunon kaj aŭdonta kanti la birdojn.” La anstataŭigo de fakulaj nomoj por bestoj, floroj k.t.p., per pli popularaj formoj ŝajnas al mi konsilinda en ĉi tia verko. Ekzemple, kiom da Esperantistoj scias ĉu “melolonto” estas birdo, besto, aŭ fiŝo ? La kunmetaĵo “majskarabo”,

se ne tiom preciza, estas almenaŭ pli facile kompreneble kaj memorebla.

La eldonistoj promesas pliajn librojn en ĉi tiu serio, se ili ricevos antaŭmendojn. Sed kie estas la merkato por ĉi tiaj libroj ? La nombro de laŭnaturaj Esperantistoj estas (bedaŭrinde) tre malgranda. Ĉu estas naive esperi, ke individuaj plenkreskuloj aŭ preferinde nia movado mem povos iomete subvencii entreprenon, kiu celas helpi en unu el la plej esperdonaj sferoj de Esperantista laboro ?

K. Stephenson.

Ricevitaj :

La Foiro de Padova eldonis kvin-koloran Esperantlingvan afiŝon 80cm × 45cm ; ankaŭ bele presitan 8-paĝan libreton “Padova kaj ĝia Foiro”. Tiu lasta taŭgas por ĉiu jaro kaj estas havebla ĉe la Foir-Estraro, Fiera Internazionale di Padova, Via N. Tomaseo 59, Padova, Italujo.

Nürnberg. Faldprospekto kun priskribo de rondiro al la vidindaĵoj kaj mapo de la civito. Eldonis Nurnberga Trafikoficejo, havebla ĉe la Esperanto-Informejo, Esperanto-grupo Nürnberg, Mögeldorfer Hauptstr. 2, Nürnberg, Germanujo.

Bodø, Ĉefurbo de la provinco Nordland. Bonpapera, belpresa faldprospekto, kun bildoj kaj priskribo de la nova urbo kaj ĝia historio. Eld : Esperantoklubo de Bodø, Urtegardsgata 26, Bodø, Norvegujo.

Berlin de Hodiaŭ. Utila kaj tre interesa faldprospekto pri Berlin. Enhavas programproponojn, liston de vidindaĵoj, teatroj, distrejoj, k.t.p. Eld : Berliner Esperanto-Verlag, Berlin-Nukölln, Teupitzer Strasse 111.

Sukcesa Kongreso de S.A.T. en Sheffield

La 26a Kongreso de S.A.T., kiu okazis de la 25a ĝis 31a de julio en Wortley Hall, kastelo kun belega parko situita ne malproksime de la industria centro Sheffield, Anglujo, unuigis 190 membrojn kaj amikojn de S.A.T. en laborplena kongreso kaj en tutsemajna intima kunvivado. La partoprenintoj, el kiuj pli ol la duono venis el Francujo, la aliaj el Britujo mem, el Nederlando, Svedujo, Germanujo, Belgujo, Danujo kaj Islando, havos en memoro por longe tiun ĉi harmonian familiecan kongresan okazaĵon konsistantan el multvaria programo.

Sabate la 25an jam interfratiĝe kontaktiĝis la alvenintoj en komforta salonego de la kastelo. Dimanĉon matene okazis la solena malfermo, sekvita posttagmeze de publika kunveno kun muziko en plenaero antaŭ la kongresa domego. Salutis interalie la Vic-urbestro de Barnsley kaj sindikataj reprezentantoj.

Tri laborkunsidoj okupis tri matenojn de la semajno. En ili oni traktis kaj akceptis, preskaŭ unuanime, la raportojn de la gvidinstancoj, post vigla diskutado kaj utilaj sugestoj. La Gvidrezolucio de la kongreso, akceptita kontraŭ nur unu voĉo, havas jenan tekston:

“La Kongreso, aprobinte kun nur unu kontraŭa voĉo la Raporton de la Plenum-Komitato kaj de la ceteraj instancoj de la Asocio, rekonfirmas, ke la praktikado de Esperanto por konkretaj taskoj kaj celoj estas la plej bona pruvilo pri la fakta valoro de Esperanto, sekve la plej taŭga maniero de propagando”.

Okazis kvin prelegoj kaj unu Demandvespero, ĉi lasta pri la stato de la brita laborista movado kaj ĝia organizita movado. Kvar kompetentaj

britaj kamaradoj respondis lerte al la skribe formulitaj demandoj el la mezo de la kongresanaro.

La prelegoj tuŝis plej diversajn temojn: oni aŭdis pri sindikata kaj kooperativa movado, pri la idearo de la verkoj de Roman Rolland, pri Racio kaj Mistiko, pri Sennaciismo kaj Belamiismo, pri Islanda socia kaj kultura evoluo, ĉi lasta kun lumbildoj.

Flanke de tiu ĉi kleriga laboro okazis agrablaj ekskursoj kaj distraj aranĝoj: tuttaga ekskurso al York, kun vizitoj al la vidindaĵoj de tiu ĉi antikva urbo, kaj duontaga ekskurso al Castleton (kavernoj) kaj Haddon Hall (mezepoka historia domego).

Marŝalo Tito kaj Esperanto—*fino*.

militdangero dum homoj sin armas por gardi la pacon; sed tuj kiam unuopaj grupoj provas uzi la armitajn fortojn por siaj celoj tiam povas ekesti milito. Ĉe la vastaj amasoj, ĉe la popoloj mem, ekzistas granda deziro por la paco kaj neniu psikologia provo ĝis nun povis krei ĉe popolo emon al milito.

“Malgraŭ la fakto ke en 1948 Jugoslavujo ne trafis simpatian komprenon en okcidento, ni ne povis akcepti la postulojn de Sovetujo ĉar tio igus nin duonkolonia, eĉ kolonia, lando. Tiutempe nia armeo havis grandan signifon kaj ni oferis grandan parton de nia nacia enspezo por la defendaj celoj. Helpon ni ricevis nur en la lastaj jaroj. Tamen dum la tuta tempo de 1948 ĝis nun la sola celo de nia eksterlanda politiko estis kaj estas, konservi la pacon, ĉar tio estas demando de la vivo mem. Tasko de nia militpotenco estas ankaŭ helpi al la pacamaj popoloj en okazo de agreso. Eĉ se Sovetujo volus plibonigi rilatojn kun ni tio ne povus ŝanĝi nian pacaman politikon.”

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 252

4an de aŭgusto 1953

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de julio kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1952 :

	1952	1953
Asociaj membroj	6794	5466
Individuaj membroj :		
MJ 869		852
MA 3671		3795
MS 501		592
Patronoj .. 10		6
DM 262		260
HM 57		58
	5370	5563
	12164	11029

PERANTO

Svedujo

Sveda Esperanto-Federacio, Tegelbacken, Stockholm C. Giro-numero 2012.

DELEGITOJ

Brazilo

Bauru (São Paulo). FD (Fotografio) : Leonidas Silva, Caixa Postal 714.

FD (Ŝakludo) : M. Matiazzo, Praca D. Pedro II no. 3, 13.

Curitiba. D : vakas.

Recife (Pernambuco). VD : A. Pinangé Soares, Caixa Postal 421.

Santanesia (Rio de Janeiro). D : Olavo C. Guimarães, Santanesia. Tel : Barra Piraí-800.

Britujo

Bodmin (Cornwall). D : H. Scarle, c/o R. Dawe, 16 Fore Street. Tel : 440.

London N.W.1. VD : vakas.

Whitworth (Lancs.). D : F. W. Shaw, Ebor Mount, Healey, Whitworth, Rochdale.

Cejlono

Bandarawela. D : La Ven. Thero Njanasatta, Kolatenna Hermitage.
FD (Budhismo) : La D.

Danlando

Gentofte. FD (Ekonomio) : S. Dragsted, Ahlmannsalle 13 St., Hellerup. Tel : Hellerup 7594.

Lyngby. FD (Ekonomio) : vakas.

Egiptujo

Alexandria. D : vakas.

Germanujo

Göttingen. D : vakas.

Limburg/Lahn. D : L. Goppel, Diezer Str. 17. Tel : 524.

Marburg. D : vakas.

Tailfingen (Württemberg). D : W. von der Ley, Brunnenstr. 73. Tel : 5680.

Jugoslavujo

Beograd. D : M. Šaponjić, Svetog Save 23/I, Beograd IV.

Rijeka. VD : V. Skomina, Kumičićeva 28, Rijeka III.

Nederlando

Den Haag. FD (Kristanismo) : D. de Boer, Druivenstraat 32.

Rotterdam. FD (Turismo) : J. Telling, Schietbaanlaan 106-a, Rotterdam-C. Tel : 50871.

Svedujo

Ĉefdelegito : vakas.

Huskvarna. D : E. Lindell, Nordskogen.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Poledna, S-ro C., São Paulo, Brazilo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1953

515. Bowell, F-ino B., Bristol, Anglujo
516. Morton, F-ino H. R., London, Anglujo
517. Mills, S-ro W., Waimate, Novzelando
518. Denton, S-ino M., London, Anglujo
519. Kellermann, S-ino M., Wien, Aŭstrujo
520. Herlemont, S-ro H., Issy-les-Moulineaux, Francujo
521. de Thomassin, Abato P., Issy-les-Moulineaux, Francujo
522. Schauenberg, S-ro E., Genève, Svislando
523. de Gouveia, S-ro G. A., Belo Horizonte, Brazilo
524. Rabello, S-ino Z. C., Belo Horizonte, Brazilo
525. Alves, D-ro J. P., Domingos Martins, Brazilo
526. de Araujo, S-ro G. S., Rio de Janeiro, Brazilo
527. Augusto, S-ro O., Barra Mansa, Brazilo
528. Batista, S-ro A. J., Rio de Janeiro, Brazilo
529. Braga, S-ro I. G., Rio de Janeiro, Brazilo
530. Brandão, S-ino L. de S., Rio de Janeiro, Brazilo

531. Burger, S-ro P. R., Lages, Brazilo
532. Carvalho, S-ro A., Bebedouro, Brazilo
533. Cavaco, S-ro J. G., Rio de Janeiro, Brazilo
534. Cavalcanti, S-ro A. B. dos S., Vitória de Santo-Antao, Brazilo
535. Cavalcanti Filho, S-ro M. T. de M., João Pessoa, Brazilo
536. Cordeiro, S-ro J. J., Ourinhos, Brazilo
537. Corrêa, S-ro E., Porto Alegre, Brazilo
538. da Costa Filho, S-ro F. F., Rio de Janeiro, Brazilo
539. Costa, S-ro L. J., Santos, Brazilo
540. Deckers, S-ro R. E., Catalão, Brazilo
541. Dionisio, S-ro C. H., S. Leopoldo, Brazilo
542. Domingues, D-ro C., Rio de Janeiro, Brazilo
543. de Freitas, S-ro O., Alagoinhas, Brazilo
544. Gonçalves, S-ro W. F., Porto Alegre, Brazilo
545. Ludka, S-ro P. de O., Niteroi, Brazilo
546. Malheiro, F-ino D. do A., Rio de Janeiro, Brazilo
547. Moraes, S-ro A., Rio de Janeiro, Brazilo
548. Moreira, S-ro J. de B., Belo Horizonte, Brazilo
549. Oliva, S-ro S., São Paulo, Brazilo
550. de Oliveira, S-ro L. J., Santos, Brazilo
551. Pádua, S-ro G., Rio de Janeiro, Brazilo
552. Passos, S-ro S. F., Fortaleza, Brazilo
553. Peixoto, S-ro O., Niteroi, Brazilo
554. Pimentel, S-ro C., São Paulo, Brazilo
555. Quinaud, S-ro I. M., Pirapora, Brazilo
556. Rocha, S-ro P. N., Franca, Brazilo
557. Santos, S-ino Z. C., Teofilo Otoni, Brazilo
558. de Souza, D-ro J. M., Juazeiro, Brazilo
559. Teixeira, S-ro D., Belo Horizonte, Brazilo
560. Timponi, D-ro M., Rio de Janeiro, Brazilo
561. Vaz, S-ro A. J., Rio de Janeiro, Brazilo
562. Viana, S-ro I. L. M., Belo Horizonte, Brazilo
563. Viana, S-ro J., Belo Horizonte, Brazilo
564. Wehrs, F-ino E., Niteroi, Brazilo
565. Zamora, S-ro A., Porto Alegre, Brazilo
566. Piauhi, D-ro J. N., Salvador, Brazilo
567. d'Amorim, S-ro N. D., Maceió, Brazilo
568. Falcão, S-ro F., Belem, Brazilo
569. Villa Nova, S-ro T. T., Recife, Brazilo
570. Siedlecki, S-ro K., Matinhos, Brazilo
571. Silva, S-ro B., Ribeirão Preto, Brazilo
572. Coutinho, S-ro A. C., Rio de Janeiro, Brazilo
573. de Almeida, S-ro P. R., Belo Horizonte, Brazilo
574. Campos, D-ro W., Pitangui, Brazilo

575. Japaulo, S-ro V., Franca, Brazilo
576. Sharpe, S-ro L. A., Burlington, Usono
577. Tuch, F-ino R. M., Toronto, Kanado
578. Rezende, D-ro C., Belo Horizonte, Brazilo
579. Weimar, S-ro E. J., Vacaria, Brazilo
580. Sales, D-ro G. de O., Canguaretama, Brazilo
581. Maranhao, D-ro A. de A., Canguaretama, Brazilo
582. Araujo, D-ro H., Vitoria, Brazilo
583. de Araujo, F-ino I. B., Rio de Janeiro, Brazilo
584. Centeno, S-ro L. W., Vacaria, Brazilo
585. Gouveia, S-ro R. L., Rio de Janeiro, Brazilo
586. da Veiga, S-ro J. E., Goiânia, Brazilo
587. de Melo, S-ro J. O., Rio de Janeiro, Brazilo
588. Guimarães, S-ro R. P., Ateno, Grekujo
589. Cunha, S-ro J. B. O., Rio de Janeiro, Brazilo
590. Fernandes, D-ro A. G., Areia Branca, Brazilo
591. de Freitas, S-ro A. W., Rio de Janeiro
592. Gaio, S-ro M. J., Rio de Janeiro
593. Silva, D-ro M. M. F., Rio de Janeiro

DONACOJ al la Ĝenerala Kaso : F-ino E. Berry 2ŝ. 6p., H. Davies 40ŝ., W. W. Hide, 5ŝ., A. G. Tucker £10, S-ino M. T. Denton 12ŝ. 6p., F. W. Shaw 14ŝ. 6p., Brita Esp.-kongreso 40ŝ., N.P.J. 40ŝ.

DONACOJ al Fondaĵo Montevideo : T. Jung 20ŝ., T. L. C. Bluett 10ŝ., P. Thorsen 5ŝ., F. Piot 14ŝ., S-ino J. Tresorier 20ŝ., F-ino G. S. Pentermann 91ŝ., H. Bakker 4ŝ., T. J. Guéritte £25, E. G. Lane 5ŝ., S. Alberich-Jofré 40ŝ., R. Gisbert 20ŝ., R. Cirera 5ŝ., D.D. 5ŝ., L. Santamarina 5ŝ., A. Santamarina 5ŝ., J. Viver 5ŝ., M. Buscató 5ŝ., Fr. Alsina 20ŝ., J. L. Tortel 20ŝ., L. Kaurić 7ŝ., S-ino E. Lapenna 12ŝ.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

Fraŭlino (nova Esperantistino) deziras korespondi en la tuta mondo pri turismaj aferoj kaj vojaĝoj. Adr. F-ino Liliane Theodon, Route de Bergues, GHYVELDE (Nord), Francujo.

Internacia Esperanto-Ekspozicio en Decembro 1953 (Infanaj desegnaĵoj, poŝtmarkoj, k.t.p.). *Gesamideanoj* bonvolu skribi al ni. Fraternité Esperantiste, 65 Rue Victor Hugo, ST. POL SUR MER (Nord), Francujo.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.
Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.
Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Kaj la korvoj alportadis al li panon kaj viandon matene kaj panon kaj viandon vespere ; kaj el la torento li trinkadis.

I. Reĝoj 17. 6.

La Nova Kristaneco en la lumo de scienco, bazita je la universala analogio kaj je la interna senco de sankta Biblio, anoncita en verkoj de sveda scienculo kaj reformanto Em. Swedenborg, malkaŝas la misteron de homa animo kaj postmorta vivo. Postulu la traktojn senpage. Aldonu, se eble, rpk. Adr. Jan B. Vlach, Luzická 21, PRAHA XII, Ĉeĥoslovakujo.

Ringwood Grammar School (fondita en 1577), West Hill Road, BOURNEMOUTH, Anglujo, bonvenigas knabojn el Britujo kaj aliaj landoj por eduko cele al Ĝenerala Eduka Atesto aŭ por libertempoj.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage pere de la Sekretario de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, LOONOPZAND, Nederlando.

Ĉu ie en la mondo troviĝas esperantisto, kiu posedas fadenrekordilon kaj volas korespondi sone kun dana samideano? Ole Nederland, kampo de militrezistantoj (C.A.-lejren), OXBØL, Danujo.

38-jara S-ino Martta Björk, HEINOLA 2, Finnlando, deziras interŝanĝi PI, naciajn memoraĵojn, gazetojn, bildverkojn k.t.p., k.ĉ.l.

S-ro Onias Almeida, Rua F. de Santana no. 2, Parque Cruz Aguiar, SALVADOR, Bahia, Brazilo, deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kaj leterojn kun la tuta mondo. Nepra respondo.

Deziras korespondi kun gesamideanoj de la tuta mondo pri diversaj temoj. Adreso : J. C. Machado, Caixa Postal 68, TUPACIGUARA, Minas Gerais, Brazilo.

Mi deziras ricevi esperantaĵojn por propagandi nian lingvon, kaj prezenti ekspozicion. Bonvolu helpi. Francisco Navarro, Apartado Correos 170, CARTAGENA, Hispanujo.

Kelkaj samideanoj diversaĝaj, divers-profesiaj, deziras korespondi. Precizigu aĝon, emon. Skribu al Bona Stelo, 31 rue Pêcherie, ROMANS, Drôme, Francujo.

“Het Zeepaard”. Feri-restado en Schoorl, Norda Holando, invitas vin. Apud arbaro

kaj Norda Maro. Kompleta prizorgo por modestaj prezoj. Petu prospekton al Jan van Twuiver, Friese Weg 80, ALKMAAR, Nederlando.

Interfrata Esperanto—Klubo, fondita 1.3.1953, petas esperantistojn sendi poŝtkartojn por entuziasmigi anojn helpi disvastigon de Esperanto en São Paulo. Respondo garantiata. Adreso : Rua Santo Amaro 362, SAO PAULO, S.P, Brazilo.

S-ro Diogenes B. Gobbo, Rua Dr. Cândido Cruz 664, Americana, SAO PAULO, SP, Brazilo, deziras korespondi kun geesperantistoj tutmondaj.

Prof. Elidio Taveiros, Avenida Oito 629, RIO CLARO, Sao Paulo, Brazilo, dez. interŝ. pk. sen koverto kun ĉ.l. Nepra respondo.

S-ro Helio Cardassi, bankoficisto, Avenida Onze 86, RIO CLARO, Sao Paulo, Brazilo, dez. interŝanĝi pk. kaj pm. kun ĉ.l. Garantiata respondo.

F-ino Alica Tinoco, Rua Bandeira de Gouveia 14—apt. 101 (Rocha), RIO DE JANEIRO, Brazilo, deziras koresp. kun gesamideanoj en la tuta mondo.

La 19a Kongreso de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio okazos en Wanganui de la 28a decembro 1953 ĝis la 1a januaro 1954. Salutoj al nia landkongreso estos bonvenaj. La adreso estas : La Kongressekretario, 19a Nov-Zelanda Esperanto-Kongreso, 12 Duncan Street, WANGANUI, Nov-Zelando.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun tutmondo ; Mary Barrett, 26 Castle Street, PARKSIDE, Suda Aŭstralio.

Se vi bezonas mendi marmorverkojn (monumentojn, konstruaĵojn, ŝtuparojn, pavimojn) petu informojn ĉe : Antonio Grosso, Potrignano 4, CARRARA, Italujo.

Geografio. Manuel Gomes, VELAS, S. Jorge, Açores, sendos mapon de Portugalujo mezurante 0.77 x 1.04 kolorigitan, sur diketa papero, al ĉiu unua respondanto, kiu sendos similan pri sia aŭ alia lando. Faru ankaŭ proponojn. Ne sendu antaŭ ol ricevi.

Letervespero komence de decembro. Gekomencantoj, “spertuloj”, filatelistoj, 20-60-jaraĝaj. La Esperantoklubo de Lidköping, adr. Blomberg, Lottkällsgatan 2, LIDKÖPING, Svedujo.

39-a Universala Kongreso de Esperanto

HAARLEM, 31 JULIO—7 AŬGUSTO 1953

Adreso :

POŬTFAKO 140, HAARLEM, NEDERLANDO

Aliĝilojn kaj pagojn akceptas ankaŭ

U.E.A., HERONSGATE, RICKMANSWORTH, ANGLUJO

ALIĜILO

Mi aliĝas al la 39-a Universala Kongreso de Esperanto en Haarlem, kaj samtempe mi sendas pagon.

Familia nomo¹ S-ro, S-ino, F-ino

Antaŭnomo (voknomo)¹

Strato kaj numero¹

Urbo¹

Provinco¹

(nur en landoj, kie la poŝto postulas tion)

Lando²

Profesio²

Nacieco²

Antaŭnomo de edzino aŭ infano, kiu samtempe (pere de apartaj aliĝiloj)

aliĝas al la Kongreso

Naskiĝa jaro de persono malpli ol 20-jara

Dato

(subskribo)

¹ En nacia lingvo

² En Esperanto

Aliĝoj ne estos akceptataj post la fino de junio 1954

Skribu klare, se eble per skribmaŝino

KONGRES-KOTIZOJ

	ĝis 31/12/53	ĝis 31/3/54	poste
*Kongresano	35 ŝil.	40 ŝil.	45 ŝil.
Edzo aŭ edzino de kongresano	17ŝ. 6p.	20 ŝil.	22ŝ. 6p.
Junul(in)o ne pli ol 20-jara ..	12 ŝil.	13ŝ. 6p.	15 ŝil.
* Individuaj membroj de U.E.A. pagas 5 ŝil. malpli (edzo/edzino			2ŝ. 6p.)